

“Nu, eble ne,” Alicio respondis per paciga tono, “sed ne kolerigu. Malgraŭ ĉio, mi tre ŝatus montri al vi nian katon *Dajna*; vi nepre ekamus la katojn, se nur vi povus vidi *ŝin*. Ŝi estas la plej kara dorlotaĵo en tuta la mondo,” — Alicio malvigle sencele naĝetis dum ŝi parolis — “kaj tiel komforte ŝi murmuris apud la fajro lekante la piedojn kaj viŝante la vizaĝon; ankaŭ tiel bela molaĵo por dorloti sur la genuoj, ankaŭ tiel lerta muskaptisto — ho, pardonu” denove ekkriis Alicio, ĉar la Muso elstarigis erinace la tutan felon; sekve ŝi estis certa ke ĝi tre profunde ofendiĝis, kaj ŝi rapidis aldoni: “Se estas al vi malagrabla, ni ne plu parolu pri *Dajna*.”

“*Ni* ne plu!” ekkriis la Muso, kiu tremis ĝis la lasta vostono. “Ĉu vi imagas ke *mi* volus preparoli tian temon? Ĉiam nia familio malamis la katojn kaj nun malamas, malamindaj malĝentilaj bestoj! Estonte vi jam neniam aŭdigu antaŭ mi eĉ la nomon kato!”

“Tion mi promesas tre volonte,” diris Alicio, kaj dume klopodis trovi alian paroltemon. “Ĉu vi . . . ĉu vi ŝatas . . . la hundojn?”

La Muso ne respondis. Sekve Alicio avide daŭrigis:—

“Proksime de nia domo loĝas bela, ĉarma, hundeto, kiun mi tre ŝatus ke vi vidu. Ĝi estas malgranda, helokula rathundo kun longa bukla brunhararo. Ĝi kapablas realporti la aĵojn

forĵetitajn; ĝi petas manĝaĵon sidante sur la vosto, kaj havas aliajn ĉiuspecajn kapablojn; mi ne povas memori eĉ la duonon da ili. Ĝi apartenas al iu farmisto kiu diras ke pro ĝiaj kapabloj ĝi valoras mil spesmilojn.

Li certigas ke ĝi mortigas ĉiujn ratojn kaj. . . . Ho, ve! ve! Denove mi ofendis ĝin.” Ĉar jen! la Muso naĝas for, for per ĉiuj fortoj, kun tia rapideco ke li faras irante tra la akvo grandan plaŭdbruon.

Ŝi realvokis ĝin per sia plej dolĉa tono. “Vi *kara* Muso, revenu! mi petegas; nek katojn nek hundojn ni preparolos, se al vi ne plaĉos.” Aŭdinte tion, la Muso turnis sin malrapide kaj renaĝis al ŝi. Ĝia vizaĝo estis tre pala (pro kolerio, pensis en si Alicio), kaj per mallaŭta tremanta voĉo ĝi diris: “Ni naĝu al la bordo, kaj poste mi rakontos al vi mian historion, por komprenigi pro kio mi malamas la katojn kaj hundojn.” Kaj certe estus malprudente plu prokrasti la elnaĝon, ĉar en la lageton jam enfalis tiom da birdoj kaj bestoj ke ili komencis premi sin reciproke. Jen Anaso naĝis kun Dodo, jen Loro kun Agleto, jen multe da aliaj strangaĵoj, birdbestoj kaj bestbirdoj. Unua naĝis Alicio; post ŝi sekvis la tuta birdbestaro. Post kelka tempo ĉiuj atingis la bordon kaj staris kune sur la tero, tre malsekaj.

